

La Junuloj

PRINTEMPO 2011

ENHAVO

Sinprezento de estraranoj Kiel Esperantumi? en nia kazo

会費振込

郵便振替口座 : 00140-8-755070

加入者名 : JEJ

会費 :

正会員 (35歳未満) 1500円 /年

高校生まで 400円 /年

新規入会者 750円 /年 (初年度のみ)

賛助会員 (35歳以上) 2000円 /年

Ĝiri kotizon

Japana poŝtoĝira konto, Numero: 00140-8-755070

Nomo de konto: JEJ

Kotizo:

Regula membro (malpli ol 35-jaraĝa) 1500enoj/jaro

Ĝis altlerneĵano 400enoj/jaro

Novmembriĝinto 750enoj/jaro (nur en la unua jaro)

Subtenanto (35-jaraĝa kaj pli) 2000enoj/jaro

あなたも記事を書いてみませんか?

「La Junuloj」では皆様の投稿やご感想を募集しています。

下記宛先までお送りください。

次号は8月に発行します。

Nu, skribu artikolon!

Ni atendas vian penson kaj kontribuon per via artikolo! Bonvolu sendi ĝin al la jena adreso. La venonta numero eldoniĝos en aŭgusto.

電子版について

今号の電子版を公開しています。詳しくは下記 JEJ のウェブページをご覧ください。

Pri reta versio

Ni publikigas retan version de ĉi tiu numero.

Bonvolu viziti al retejo de JEJ (skribita sube).

La Junuloj 2011 年春号 (n-ro 90)

2011 年 6 月 30 日発行

編集 藤森耕平

発行 日本青年エスペラント連絡会

〒162-0042 東京都新宿区早稲田町 12-3 エス

ペラント会館 気付

メールアドレス

jej_kontakto@yahooogroups.jp

ウェブページ

http://www.jej.jp

La Junuloj printempo 2011 (n-ro 90)

La 30an de junio, 2011 eldonita.

Redakto: FUJIMORI Kohej

Eldono: Japana Esperanto-Junularo

Japana Esperanto-Junularo (JEJ) p.a.

Esperanto-Kaikan, Tokyo-to, Sinzyuku-ku,

Wasedamati-12-3, JP-162-0042 Japanio

Ret-adreso:

jej_kontakto@yahooogroups.jp

TTT-ejo:

http://www.jej.jp

2012 年の IJK の会場が奈良
県天理市に変更になりました。

Ni ŝanĝis Kongresejon de IJK
2012 al la urbo Tenri, la
gubernio Nara.

Sinprezentoj de estraranoj 役員の自己紹介

JEJ-estraranoj de junio de la jaro 2011 sinprezentas.

JEJの2011年6月からの役員を紹介します。

1. Kia homo vi estas?
2. Kial kaj kiel vi komencis lerni Esperanton?
3. Ambicio kiel estrarano de JEJ.
4. Aliaj aferoj libere.

Prezidanto: OKABE Akiumi

1. Saluton! Mi naskiĝis en Fukuoka kaj kreskiĝis en Nara. Mi kromlaboras en privata lernejo (ĵuku), kiel instruisto de la angla lingvo, matematiko kaj scienco. La kosmo interesas min. Krome mi ŝatas sporton. Precipe mola (japana) teniso plaĉas al mi.

2. Du gravaj figuroj Miyazawa Kenji kaj Hasegawa Teru instigis min lerni Esperanton. Antaŭ 3 jaroj mi vojaĝis en Iwate kaj veturis per trajno laŭ Kamaiŝi-Linio, kies kromnomo estis nomata laŭ la romano "Nokto de la Galaksia Fervojo" de Miyazawa Kenji. La stacidomoj havas kromnomojn en Esperanto. Kiam mi vidis Esperantajn nomojn de la stacidomoj, mi ne komprenis, en kiu lingvo ili estas skribitaj. Post la vojaĝo mi esploris Esperanton kaj trovis la libron "Taglibro de Hasegawa Teru". Kiam mi legis la poemon en ĝi "Du pomoj perditaj", mi estis tre kortuŝita kaj ploris en urba biblioteko. Tiam mi decidis studi Esperanton serioze.

3. Venontjare okazos la 68a Internacia Junulara Kongreso (IJK68) en Japanio. La kongresejo estas en mia hejmurbo, Tenri. JEJ invitas IJK68. Por administri la kongreson ni bezonas 15 junulojn, kiuj bone parolas Esperanton. Nuntempe iu diras, ke neniuj junuloj en Japanio parolas Esperanton sufiĉe bone. Mi altigu la

Esperantan nivelon kaj varbu novajn junulojn!

4. Esperu kaj laboru, estonteco estas la nia. Vivu La Junuloj!

要約

エスペラントを始めたきっかけは、宮沢賢治と長谷川テル。来年日本で開催される IJK68の会場は、私の地元です。大会準備はもちろん、自身のエスペラント学力の向上と新しい若者の取り込みに力を尽くします。

Redaktoro: FUJIMORI Kohej

1. Mi estos fasonisto. Mi faras vestojn ĉiutage. Mi dezajnas fake strangajn kostumojn baze de diversaj naciaj kostumoj. Nu, mi estas linuksouzanto. Mi uzas "Ubuntu"-n. Tiu ĉi organo ankaŭ estas farita per Ubuntu. Nun mi desegnas vestojn per programaro "QCAD". Ĝi estas Komputila Asistanto por Desegno (KAD). Ĝi ege helpas min. Estas nekredeble, ke la programaro estas senpaga. Mi ĝuas mian vivon per senpaga operaciumo (Linukso), senpaga DTP(perkonputila eldonado)-programaro kaj senpaga KAD-programaro.

2. Mia instruisto de altlernejo estis esperantisto. Dank'al li mi eksciis Esperanton. Komence mi lernis E-on per interreto kaj libro por komencanto. Kaj nun mi apartenas al loka societo.

3. Mi volas eldoni daŭre tiun ĉi organon. Sed mi tute ne havas diligentecon por JEJ kaj E-o. Mi plenumos malserioze E-an vivon. Ĉar mi devas ekplenumi mian revon ĝis 2012. Do, antaŭpardonon!

4. Ni ĉiuj estas la katoj de Schrödinger. Ni estas duonmortaj kaj duonvivaj. Sciu ĝin, kaj vi povas vivi plej bone.

要約

高校の担任教師の影響でエスペラントを始めました。いい加減なエスペラント生活を楽しむ予定です。

Sekretario: UEDA Hiroaki

1. Mi loĝas en Hachioji, kaj mi studas fizikon.
2. La ĉambro en Esperanto-klubo en Universitato de Kyoto estas alloga.
3. Mi volas, ke junaj Esperantistoj multiĝas.
4. Saluton!

要約

京都大学のエスペラントクラブで始めました。若者を増やしたいです。

Sekretario: ĈE Juna

1. Mia nomo estas Ĉe Juna. Mi venis el Koreio. Kaj de antaŭ unu jaro mi loĝas en Osako. Mi apartenas al Osaka Esperanto-Societo kaj lernas Esperanton tie. Mia Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉa. Sed mi esperas, ke mi amikiĝos kun multaj Esperantistoj.
2. Ĉar mi deziras paroli Esperante kune kun certa esperantisto. Mi konatiĝis kun ŝi en Kioto antaŭ kvar jaroj okaze de mia unua restado en Japanio. Sed tiam mi ne povis paroli al ŝi Esperante krom "Ĝis". Ŝi ne estas japano kaj jam revenis al sia lando. Kaj mi pensis, ke mi devas fari ĉion eblan, por ke ni revidu. Kaj nun mi lernas

Esperanton en mia rondo OES kaj baldaŭ finos mian unuan kursolibron. Sed estas por mi malfacile lerni Esperanton en la japana. Pro tio mi lernas Esperanton helpe de mia amiko, kiu estas malnova japana Esperantisto, kaj de korea hejmpaĝo.

3. Mi celu ke mi ne estu komencanto.

4. Somere mi partoprenos en Nur-Esperanta Kunvivado. Ĉu ni interparolu Esperanton?

要約

日本で知り合った海外のエスペランティストと再会するためにエスペラントを続けています。たくさんのエスペランティストと友達になりたいです。

Kasisto: JAĜIMA Hiroŝi

1. Mi laboras en maljunulejo kiel helpanto de maljunuloj. Mi estas landa peranto de Pasporta Servo. Mi gastigas vin, eĉ se vi estas japanlingvano, sed, se vi parolas Esperanton. Mi loĝas en la gubernio Saitama.
2. Mi antaŭlonge ekkonis Esperanton leginte libron pri Miyazawa Kenji. Mi eklernis Esperanton en 2003, ĉar mi deziris interparoli rekte kun homoj tra tuta mondo.
3. Ĉi-jare mi fariĝas 35-jaraĝa. Pro tio mi serĉas kandidaton por kasisto. Sed nun mi laboras kiel eble diligente, kvankam mi estas treege maldiligenta.
4. Mi ŝatas rajdi biciklon. Ni kune rajdu.

要約

宮沢賢治の本でエスペラントを知りました。今年35歳なので私の後任を探しています。